nia Gijona E-asocio, kiu partoprenis en la kreadon de tiu organizaĵo kune kun Luis Serrano, Adonis G. Meana kaj aliaj hispanaj samideanoj.

La numero 27a de **HELECO** (julio-aŭgusto de 1982) informis ke estis asignita al tiu gazeto iu distingo farita de la hispana Sekcio de **ILEI** (**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**). La distingo konsistis en pokalo, kies desegnon oni montras en la revuo, kaj Honora Diplomo "kiel pruvo de entuziasmo, intereso kaj aktivado por la Internacia Lingvo Esperanto", laŭ tekstas la diplomo mem. Vere, la eco kiu igis **HELECO**-n meriti tian distingon estis la reguleco en ĝia eldonado; ĝuste kaj akurate ciu dumonato aperadis nova numero de tiu modesta broŝuro. Ekde la komenciĝo de la jaro 1983 ŝanĝiĝis la desegno de la titolo aŭ kapo de tiu revuo.




**Nova gazet-kapo de HELECO ekde 1983**

En tiu jaro 1983 la **Hispana Kongreso de Esperanto** okazis en Zaragozo. Ne malpli ol dek personoj de nia urbo ĉeestis ĝin. Kadre de tiu kongreso, inter la fakaj asocioj kiuj profitis ĝin por okazigi siajn asembleojn estis tiu de la hispana Sekcio de **MEM** (**Mondpaca Esperantista Movado**). Ni memoru ke du samideanoj de nia Gijona E-grupo estis membroj kaj kunfondintoj de tiu organizaĵo, nome Adonis G. Meana kaj Faustino Castaño kiu estis la Sekretario de tiu asocio.



Kogresa foto de Zaragozo 1983

La asembleon ĉeestis, inter aliaj membroj el diversaj lokoj de la lando, Luis Serrano, kiu estis la Prezidanto de tiu **MEM**-Sekcio, kaj ankaŭ la Ĝenerala Sekretario de **MEM**, la franco W. Gilbert. Ĉi lasta surbrustigis la honor-insignon de **MEM** al kelkaj membroj de la pacdefenda asocio, inter ili la Sekretario, pro ties aktivado en la starigo de la hispana Sekcio. Proksimume en tiu epoko, kelkaj membroj de tiu porpaca Esperanta rondo, inter ili la du menciitaj gijonanoj, subgvide de Luis Serrano entreprenis la kreadon de hispana sekcio de alia internacia Esperanta movado, konkrete, **IKEK** (**Internacia Komunista Esperantista Kolektivo**).



**Oni surmetas al Faustino Castaño la Honor-insignon de MEM**

Ĉar, iamaniere, nia historia raportado kaj precipe ĉi-tiu ĉapitro, titolita "**Nia diligenta kolegaro…**" estas kvazaŭ omaĝo al la Esperantistaj aktivuloj de nia Gijona E-asocio aŭ en ia rilato kun ĝi, indas ke ni menciu ankaŭ la agadon de samideano Julio Argüelles. En la epoko pri kiun ni raportas nun, li okupiĝis pri la biblioteko de la Esperanta grupo, kaj poste li havis aliajn respondecojn en la komitato de la grupo, kaj ni jam menciis ke li gvidis kursojn de Esperanto en publikaj lernejoj de la urbo, sed lia plej notinda aktivado disvolviĝis en alia tereno, en kiu li estis unika. Li estis dum multaj jaroj la demarŝanto de ĉiu ĝena afero de interrilato kun burokrataraj k.s. instancoj: luado de aŭtobusoj por ekskursoj kaj serĉado de gastejoj por kongresanoj, serĉado de restoracioj por la E-bankedoj, organizado de la solenaj kaj spektaklaj aktoj de la esperantistaj festoj… En iu numero de la kolekto de **HELECO** de la jaro 1983 troviĝas iu akrostika poeziaĵo kiun dediĉis al li Alcibiades González Meana substrekante tiun lertecon de Julio por tiaspecaj taskoj. En alia numero de la sama jarkolekto de la gazeto estas simila poeziaĵo sed ĉifoje dediĉita al Santiago Mulas pro ĉi ties dediĉado al la gvidado de lernokursoj de Esperanto. En ĉi tiu ĉapitro ni prezentas la tekston de ambaŭ akrostikoj kiel omaĝo al tiuj du samideanoj, ankoraŭ vivantaj, kaj samtempe al la propra poeto, Alcibiades, kiu forpasis jam antaŭ kelkajn jarojn.

Por la lerno-jaro 1983-1984 nia asocio organizis du kursojn de Esperanto, gviditaj de Santiago Mulas kaj Adonis González Meana. Same estis okazinta por la antaŭa lerno-kurso. Radio Gijón kaj la urba ĵurnalo informis pri kurso komenciĝinta en nia sidejo la 17an de oktobro.